



**1(155)
2016**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Rikardo Ŝulco

Revo vana

Mi ĉiam revis vane kaj erare,
Fidante pri la homa racieco.
Vidante homojn morti grandaare,
Sopiris pacon laŭ kristana deco.

Fidante pri la homa racieco,
Mi revis pri la sav' de l' biosfero,
Sopiris pacon laŭ Kristana deco
Kaj savon de la hum' kaj de la Tero.

Mi revis pri la sav' de l' biosfero
Kaj decidiĝis vivi vegetare.
Ho rev' pri l' sav' de l' hum' kaj de la Tero!
Mi ĉiam revis vane kaj erare.

Hejmeniĝo

La eternecon baldaŭ vi atingos.
Vi fine malhejmiĝos sur la tero,
Kaj la destino laste vin estingos.
Ne plendu vi pro la perdita sfero!

Vi fine malhejmiĝos sur la tero,
Vi pro konvinkoj ne plu akre luktos,
Ne plendos vi pro la perdita sfero,
Kontenta, se strebado iel fruktos.

Vi pro konvinkoj ne plu akre luktos,
Vi pacon transe jam por vi distingos,
Kontenta, se strebado iel fruktos.
La eternecon baldaŭ vi atingos.

Efemeraĵoj

La hom' naskiĝas, kaj la hom' forpasas.
Estiĝas sunoj, ree malaperas.
La vivo mem sin forte embarasas,
Sin tiel malamikojn mem generas.

Estiĝas sunoj, ree malaperas.
Senĉese plimultiĝas la homaro,
Sin tiel malamikojn mem generas.
La savo estus eble avataro.

Senĉese plimultiĝas la homaro.
La materion la spirito ĉasas.
La savo estus eble avataro.
La hom' naskiĝas, kaj la hom' forpasas.

Limo

Vi plimultiĝu kaj kreskigu fruktojn!
La vasta Tero havas multan spacon.
Nur strebe vi travivos viajn luktojn.
De l' Tero vi plenigos la surfacon.

La vasta Tero havas multan spacon.
Sed ĉio ie fine ja limiĝos.
De l' Tero vi plenigos la surfacon.
Postvivos vi, se iel vi paciĝos.

Ĉar ĉio ie fine ja limiĝos.
Jam estas temp' pripensi la reduktojn.
De l' Tero vi plenigos la surfacon.
Vi plimultiĝis. Nun produktu fruktojn!

Ekspozicioj „Esperanto – lingvo sen limoj” en krakovaj bibliotekoj

Aŭtune 2015 en Krakovo okazis interesa ekspozicio „Esperanto – lingvo sen limoj” organizita de prestiĝa Jagelona Biblioteko ĉe Jagelona Universitato. Dudekan de oktobro okazis sole-na malfermo kaj kelkajn semajnojn poste, la 9-an de novembro speciala programo ligita kun fermo de la ekspozicio.

Krakova ekspozicio, iniciatita de s-ino Gizela Matray, ekestis ĉefe dank' al grandega laboro de s-ino Małgorzata Kusak, respondeculino pri ekspozicioj en Jagelona Biblioteko kaj de s-ro Mariusz Paluch, pentroartisto kiu verkis afiŝojn, multe helpis ĉe organizado de la ekspozicio kaj elpensis ĝian nomon. Ĉeokaze ili eklernis Esperanton!

Al preparo de la ekspozicio, ĝia solena inaŭguro kaj malfermo kontribuis diversaj esperantistoj, inter alie anoj de Krakova Societo ESPERANTO, Pola Esperanto-Asocio, Pola Esperanto Junularo, Internacia Ligo de Esperantistoj Instruistoj, studenta rondo de la universitato, organizo Eŭropo-Demokratio-Esperanto kaj ankaŭ neesperantistoj. Tio tre gravas, ĉar individuoj de diversaj organizaĵoj foje havas iomete alian vidpunkton aŭ preferas fari ion alimaniere ol aliaj. Krome diversaj generacioj havas diversajn spertojn kaj malsamajn atendojn. Tre bonas, kiam ili volas kunlabori pri komunaj aferoj kiel tiu-ĉi ekspozicio, pro kio mi tre ĝojas. Kiel diris prof. d-ro Leszek Kordylewski, unu el la kontribuantoj: *forto estas en unueco*.

Laŭ mi, tiu ekspozicio bonege prezentis tiun-ĉi ideon. Dank' al fruktodona kunlaboro de diversaj kontribuantoj ekestis bonega ekspozicio. Kaj fakte eĉ du. Sed pri tio poste.

Leszek Kordylewski estas aktiva esperantisto, kiun mi ekkonis ĉi-julie, dum 100-a UK-o okazinta en franca Lille. Tie ni unuan fojon kune parolis pri la plano okazigi la ekspozicion. Poste ni renkontiĝis en Krakovo, kien li venis por libertempi, kvankam li laboras en ĉikaga universitato. Lia patro estis fama astronomo, kiu dum multaj jaroj loĝis en Krakovo, laboris ĉe Jagelona Universitato kaj malkovris polvajn lunojn de Tero (t.n. lunojn de Kordylewski), situantajn en la punktoj de Lagrange de la sistemo Tero-Luno. Nuntempe unu el krakovaj stratoj portas nomon de la sciencisto Kazimierz Kordylewski. Leszek ekinteresiĝis pri Esperanto dank' al siaj gepatroj.

Vi povas ekscii pri tio aŭskultante intervjuon kun li kaj kun aliaj geesperantistoj faritan ĉi-septembre kun esperantisto Asbjørn el Norvegio. Dank' al Esperanto mi ankoraŭ foje ekkonatiĝis kun interesaj personoj. La intervjuon oni publikigis ĉe: www.esperantujo.aq.pl/renkontoj. Sur la retpaĝo eblas rigardi ankaŭ kelkajn fotojn de la ekspozicio kaj aŭskulti fragmentojn de voĉregistrado de ĝia solena programo.

Kadre de la ekspozicia inaŭguro direktoro de la biblioteko, prof. Zdzisław Zakrzewski kaj prof. Leszek Kordylewski proponis al la alvenintoj toston omaĝe al kreinto de Esperanto, L. L. Zamenhof kaj al la lingvo mem. Poste gastoj rigardis ekspoziciaĵojn: librojn, gazetojn (inter alie diversajn egzemplerojn de Pola Esperantisto eldonataj jam dum ĉirkaŭ cent jaroj kaj alilandajn revuojn), plurmediajn eldonaĵojn sur DVD kaj kompakt-diskojn. Esperantan telefonkarton, poŝtmarkojn kaj poŝtkartojn, eldonitajn en Sosnowiec ĉeokaze de 100-a datreveno de Esperanto en la urbo (<http://www.esperanto.zanet.pl/kongreso>). La gastoj rigardis ankoraŭ esperantajn ĉemizojn, bieron kun la esperanta surskribo, tabulojn pri disvolviĝo de Esperanto prilaboritaj de Kazimierz Krzyżak kaj aliajn objektojn.

Oni prezentis interesajn librojn - romanojn, rakontojn, vojaĝraportojn, poeziaĵojn, vortarojn, lernolibrojn, gravajn librojn de diversaj religioj kiel ekzemple Sankta Biblio kaj Korano. Inter gravaj dokumentoj troviĝis lastatempa decido de pola parlamento agnoski la internacian lingvon kiel nacian kulturheredaĵon, rekonata ankaŭ de UNESCO. Super vitrokestoj kun ekspoziciaĵoj pendis grandega E-flago transdonata ĉiu-jare al organizantoj de venontjara junulara kongreso. Prezentitaj objektoj devenis de bibliotekaj kaj individuaj kolektoj. Per siaj librokolektoj kontribuis inter alie

studenta rondo de Jagelona Universitato kaj Tobiasz Kubisiowski - redaktoro de revuo „PEJ-aktuale”. Bonega kaj tre interesa estis granda filatela kolekto pri Esperanto de prof. Jerzy Bartke kaj dr-o Jerzy Duda (multaj belaj poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj). Krom bonega, blanka vino oni regalis gastojn per bongustaj, parte verdaj kuketoj, volonte formanĝataj.

Al malfermo de la ekspozicio venis gastoj de diversaj polaj urboj kaj ankaŭ de Ĉeĥio kaj Italio. En aparta salono ili aŭskultis mallongan prelegon de tradukistino Lidia Ligeża pri eminenta krakova sciencisto kaj esperantisto Odo Bujwid, longjara prezidanto de Krakova Societo Esperanto kaj partoprenis lecionon de Esperanto gvidatan de universitata lekciistino Maria Majerczak, kiu proponis ankaŭ kvizon kun premioj. Venkintoj de kvizo pri Esperanto ricevis kompakt-diskojn pri la lingvo kaj slovakajn ĉokoladojn produktitajn okaze de UK-o 2016 kun eta Esperanta-slovaka vortaro. Dum la malfermo oni prezentis informon kaj disdonis flugfoliojn, ankaŭ multkolorajn broŝurojn pri venontjaraj kongresoj: UK-o en Nitra (Slovakio) - <http://www.nitra2016.sk> (ricevitaj de slovakaj esperantistoj - Petr Balaž, Jan Vajs) kaj ricevitaj de PEJ pri IJK-o en Vroclavo (Pollando) - <http://ijk2016.tejo.org> .

9-an de novembro, dum solena fermo de la ekspozicio profesia aktorino Anna Ramza, kiu ludis en teatro kaj filmo, recitis fragmentojn de pola epopeo "Sinjoro Tadeo" verkita de Adam Mickiewicz, en traduko esperanten de Antoni Grabowski, kun bela muziko de Fryderyk Chopin. D-ro Adam Łomnicki rakontis interese pri diversfakaj E-vortaroj, inter alie de matematiko, medicino kaj aliaj. Instruistino de lingvoj Magdalena Tatara, aktiva membrino de ILEI, gvidis mallongan lecionon de Esperanto. Mi prezentis informon pri E-bibliotekoj, pri modela katalogo de Esperanta literaturo www.esperanto.zanet.pl/ekatalogo/, prilaborita de Antoni Jerzy Walaszek kunlaboro kun E-Biblioteko en Vieno, kaj praktikaj informoj pri baldaŭaj E-aranĝoj, inter alie pri universalaj kaj junularaj kongresoj. Bedaŭrinde mankis jam tempo por prezenti preparitajn filmetojn pri la aranĝoj. Sciindas, ke en multaj bibliotekoj troviĝas Esperanto-verkoj. Ekzemple en interreta katalogo de Jagelona Biblioteko, kiun mi prezentis, nun haveblas kelkcent E-verkoj, ĉefe libroj sed ankaŭ son-materialoj.

Oni observis, ke vizitantoj de la biblioteko kun granda intereso dum kelkaj semajnoj rigardis la ekspoziciaĵojn. Espereble dank' al tiu ekspozicio homoj ekkonis interesajn faktojn pri la internacia lingvo kaj eble kelkaj fariĝos esperantistoj? La ekspozicio estis bonega ŝanco por sciigi neesperantistojn pri la lingvo. Ĉeokaze de la ekspozicio oni eldonis, finance subtenatan de KSE, ĝisdatigitan allogan flugfolion iam preparitan de PEA, titolitan “Esperanto – facila lingvo, bona ideo” kaj E-legosignojn, kiuj estis ambaŭ disdonitajn al vizitantoj de la ekspozicio.

D-ro Adam Łomnicki proponis okazigi similan ekspozicion en 70-jaraĝa Pedagogia Universitato en Krakovo. Dank'al tre rapida, tamen sukcesa kunlaboro de esperantistaro kaj kelkaj neesperantistoj, inter alie granda, organiza kontribuo de Joanna Kołakowska el la Pedagogia Universitato, jam 19-an de novembro 2015 direktoro de Ĉefa Biblioteko de la Universitato, d-ro Stanisław Skórka malfermis novan ekspozicion pri Esperanto. Dum inaŭguro bela muzikistino, Katarzyna Rosołek belege ludis violonon. Dr-ino Wanda Jakubaszek rakontis interese pri „Eduka signifo de Esperanto movado” prezentante multajn konvinkantajn ekzemplojn. Dr-o Adam Łomnicki rakontis pri prof. Mieczysław Sygnarski - iama tre aktiva esperantisto kaj instruisto, laborinta ĉe krakovaj universitatoj, aŭtoro de tre populara lernolibro de Esperanto (dank'al kiu komencis mia aventuro kun la lingvo), kiu nuntempe haveblas ankaŭ en Interreto: <http://eduinf.waw.pl/esp/lern/pnje/>. Preleganto interese rememoris sian instruadon de matematiko en Afriko ĉe uzo de internacia lingvo. Instruistino Magda Tatara gvidis interaktivan, tre interesan lecionon de Esperanto por komencantoj, kiun partoprenis inter alie gestudentoj de la Pedagogia Universitato. En la ekspozicio, kiun eblas rigardi ĝis fino de jaro en Pedagogia Universitato de Krakovo, oni prezentis multajn interesajn informojn kaj eldonaĵojn. Tre ekinteresis min

ekspoziciaĵoj pri Universala Kongreso de Esperanto okazinta en 1912 en Krakovo, informoj pri prof. Mieczysław Sygnarski, bonega kolekto de verkoj de krakova poetino kaj tradukistino Lidia Ligęza - nuntempa prezidantino de Krakova Societo ESPERANTO. Krom tio kaptis mian atenton multaj verkoj de E-literaturo, kreitaj en Esperanto kaj tradukitaj el aliaj lingvoj, kaj memoraĵoj, ekzemple kelkaj kongresaj libroj. Oni povis rigardi ankaŭ verdan kulturon de estonta UK-o, kiu okazos en Suda Koreo, en 2017 jaro. Aparte mi estis impresita de la multeco kaj diverseco de prezentitaj esperantaj gazetoj kaj revuoj eldonataj en kelkdek landoj de ĉiuj kontinentoj. Laŭ mi tio bonege montras aktivan uzadon de Esperanto. Oni prezentis tie inter alie jenajn gazetojn kaj revuojn: Pola Esperantisto, Slovaka Esperantisto, Hungara Vivo kaj Hungara Esperantisto, Zagreba Esperantisto, Franca Esperantisto, Le Monde Diplomatique, Esperanto - revuo de UEA, Ondo de Esperanto, Litova Stelo, Tornado (eldonita de pola E-junularo), Kontakto, Frateco - (esperanta bulteno por la spirita formado), Espero Katolika, Juna Amiko, Juna Esperantisto, Esperanto aktuell, gazeto de Germana Esperanto Junularo, Monato, Brita Esperantisto, Irana Esperantisto, Internacia Fervojisto kaj Verda Lumo - (revuoj de fervojistoj), Bulgara Esperantisto, El Popola Ĉinio, La Espero el Koreo, La Revuo Orienta, Femina, Spegulo, Internacia Pedagogia Revuo, Heroldo de Esperanto, La SAGO, Sennaciulo, Israela Esperantisto, Florenca Lilio kaj aliaj. En kelkaj prezentitaj numeroj de Zagreba Esperantisto aperis miaj tekstoj, kiujn mi proponas tralegi, ekzemple „Instigo por denove viziti Kroation” kaj „Ornitologia riĉaĵo de Kroatio” (ilustrita per multaj poŝtmarkoj - bildoj de birdoj), „GRUPE-17” – raporto pri partopreninda aranĝo okazanta ĉiu-jare en Gliwice aŭ „Poludnica 2014” – pri novjara renkonto de esperantistoj-vojaĝantoj okazanta ĉiu-jare en slovaka montaro Tatry, ankaŭ venontjare (tre baldaŭ). En lastatempe eldonita Pola Esperantisto prezentita en la ekspozicio aperis mia teksto pri „Bohema Svislando”. Inter prezentita gazetaro estis ankaŭ studenta revuo Multis-multum de Altlernejo pri Direktado kaj Bankado en Krakovo, en kiu aperis interesaj tekstoj pri Esperanto kaj vojaĝado, inter alie pri Pasporta Servo.

Al la ekspozicio kontribuis per siaj kolektoj de libroj kaj revuoj diversaj individuoj inter alie eminenta krakova artisto-pentristo kaj esperantisto Andrzej Kołpanowicz. Plaĉis al mi, ke sur preskaŭ ĉiuj ekspoziciaĵoj oni gluis numerojn kaj flanke de vitrokestoj priskribis ilin sur paperfolio laŭ la numeroj. Dank'al tio oni povis ekscii detalojn pri la prezentitaj objektoj. Ambaŭ ekspozicioj estis sukcesaj kaj helpis popularigi Esperanton! Gratulojn por organizantoj kaj kontribuantoj!

Adam Wilkus

Krakovo, 19a de decembro 2015

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontiĝoj januare kaj februare 2016 j.

- 7. 01. 2016 j. – La pola Kristnasko. Rakontoj de la anoj.**
- 14. 01. 2016 j. – Lidia Ligęza. Podlaĥio ankoraŭfoje.**
- 21. 01. 2016 j. – Oblata kaj kantika renkonto.** Pianludas Anna Ramza kaj Irena Urbańska.
- 28. 01. 2016 j. – Grażyna Porada. La esperantaj lingvaj ludoj.**

- 4. 02. 2016 j. – Lidia Ligęza. Pri vortaro de Edward Malewicz „Słownik minimum“.**
- 11. 02. 2016 j. – Stanisława Śliwińska. Norvega fabelo: Flugoranĝo...**
- 18. 02. 2016 j. – Alicja Sacha. Laŭ artikolo el „Frateco”- Plendoj povas ruinigi vian sanon.**
- 25. 02. 2016 j. – Katarzyna Kobylarczyk. Renkonto kun redaktoro pri esencaj esperantaj aferoj.**